

Studi matene, ferii posttagmeze:
Internacia FERIA Altlernejo (IFA) de Kultura Centro Esperantista (KCE)
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 587/92, 1982 majo 27 kaj 29.
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-92/SRI-1982-92-1-587-Claude-kaj-Andree-GACOND-Studi-matene-ferii-posttagmeze-IFA-KCE-elsendo-de-27-29-majo-1982.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por multaj esperantistoj alvenis la momento fiksi celon al la someraj ferioj. Tial ni opinias, ke indas raporti pri la kurs-programo, kiun proponas por la monatoj julio, aŭgusto, septembro kaj oktobro la Internacia FERIA Altlernejo (IFA) de Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds. La formulo estas konata: kleriĝi matene, ferii posttagmeze.

A.- Ĉiu kurso malfermiĝas la dimanĉon per interkonatiĝa vespero. La instruado okazas lunde, marde, merkrede, ĵaŭde kaj vendrede ekde la 9-a horo ĝis la 12-a horo. Meze de la mateno dudekminuta paŭzo permesas al ĉiuj kafumi aŭ aerumiĝi. Entute ĉiu kurso proponas do 20 lekciojn 45-minutajn, kio permesas bonan enprofundiĝon en la temo.

Cl.- Kaj pri tiuj ĉi temoj jen ni legas parton de la programo, kiun vi povas ricevi skribante al Svisa Radio Internacia aŭ al Esperanto, La Chaux-de-Fonds.

A.- De la 11-a ĝis la 16-a de julio mia edzo gvidas kurson, kiu celas lertiĝon en la parola uzo de esperanto per perbilda instruado. Programitaj ekzercoj, sub formo de lingvaj ludoj, instigos ĉiujn kursanojn daŭre paroli, ke ili estas komencantoj kaj mezkapabluloj en la parola uzo de esperanto aŭ esperanto-instruantoj, kiuj ŝatus intimiĝi kun la perbilda instruado.

Cl.- De la 18-a ĝis la 23-a de julio la nederlandano Ed Borsboom, profesoro pri literaturo, intimigos la studemulojn kun la dekdu plej bonaj verkistoj en esperanto. Estas enkonduka kurso, kiu malkovrigos la literaturan disvolviĝon de esperanto.

A.- D-ro István Szerdahelyi, esperanto-profesoro ĉe la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd gvidos la du postajn kursojn. La kurso titolita Metodologio teoria kaj praktika de la 25-a ĝis la 30-a de julio pritraktos tiun ĉi programon. 1. Metodologiaj konceptoj klasikaj kaj modernaj. 2. La sociologiaj, psikologiaj kaj pedagogiaj kondiĉoj de lingvoinstruado, motivigo, interfero, transfero. 3. La instrucela segmentado kaj organizado de la lingva niaterialo: instrufontoj, programoj, instruteknologio kaj demonstrado. 4. La bazaj kapabloj, ilia elformigo: la ekzercotipoj. 5. Kontrolo kaj praktika aplikado.

Cl.- La da kurso de d-ro István Szerdahelyi havas kiel titolon: Signo kaj signifo: enkonduko en semantikon. Ankaŭ ĝia programo estas bone priskribita: 1. Signo kaj signifo en etnaj aŭ naciaj lingvoj. 2. Signo kaj signifo en interlingvoj. 3. La signosistemo de esperanto: ĝia ekesto kaj evolutendencoj. 4. Signifanalizo kiel bazo de norma vortaro. 5. La problemoj de la termino-leksiko en esperanto.

A.- Tiuj du kursoj estos ĉiutage dividitaj en du partoj. Antaŭ la paŭzo István Szerdahelyi prelegos en kiel eble plej populara stilo, ĉiam abunde ilustrante ĉion per konkretaj ekzemploj, konsiderante, ke la plejparto de la aŭskultantoj ne estas fakuloj. La postpaŭza periodo donos al ĉiuj eblecon ekzerciĝi pere de praktikaj ekzercoj.

Cl.- De la 8-a ĝis la 13-a de aŭgusto Georges Lagrange, kiu estas konata kiel unu el la plej kapablaj nuntempaj esperanto-tradukistoj gvidos kurson pri la tradukarto. Post teoria

enkonduko la kursanoj ekzerciĝos en la arto traduki pere de programitaj taskoj. Kritikoj kaj diskutoj progresigos ĉiujn. La ekzercoj, kun kreskanta malfacileco rilatos al klasika kaj moderna literaturo, al gramatike tipaj frazoj, al tekniko kaj teatro. Kolektiva ekzerco eĉ donos ideon pri traduk-malfacilaĵoj en poezio kaj koncerne la esperantigon de kanzonoj.

A.- Samtempe la italo Dario Besseghini gvidos enkondukan kurson al formala lingvistiko kun la ĉeftemo: Ĉu esperanto estas komputebla lingvo? Se estas sufiĉe da interesatoj tiu ĉi kurso daŭrigos la postan seataĵon sub formo de seminario.

Cl.- Kaj paralele al ĝi okazos meza kurso de esperanto, kiun gvidos s-ino Perla Martinelli, la ĉefredaktorino de Literatura Foiro.

A.- En septembro, de la 5-a ĝis la 10-a la aŭstro Herbert Mayer, instruisto pri literaturo en Graz, gvidos enkondukan kurson pri la esperanto-prozistoj. Tiu aranĝo celas doni al la kursanoj bazan konon pri la verkoj de niaj plej gravaj prozistoj ekde Zamenhof al Valano.

Cl.- En oktobro disvolviĝos de la 3-a ĝis la 8-a elementa kurso de esperanto kaj de la 10-a ĝis la 15-a meza kurso de esperanto, kiujn gvidos Stefano Keller, hungaro, kiu estas esperanto-instruisto ĉe Kultura Centro Esperantista.

A.- Kiel vi konstatas, ekde la mezo de julio ĝis la mezo de oktobro studemuloj povos ĉu lertiĝi en la praktiko mem de esperanto, ĉu akiri konojn, kiuj ofte mankas al la plimulto de la esperantistoj, kio malhelpas la disvolviĝon mem de la zamenhofa lingvo. Unu el la celoj de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista estas ĝuste doni al la esperantistoj la eblecon pli bone koni sian lingvon kaj ties historion kaj literaturon.

Cl.- En la nuna etapo de la disvolviĝo de tiu Internacia FERIA Altlernejo la ĉefa problemo estas la informado pri tiuj ĉi kursoj. La aperigo de anoncoj en esperanto-revuoj superas la financajn rimedojn de pure kultura organizaĵo, tial nur malvasta publiko estas informata pri tiuj ĉi kursoj. Dua malfacilaĵo estas la manko de instrumaterialo. Ekzistas fakte preskaŭ nenio por instrui iom sisteme la esperanto-literaturon kaj bazajn nociojn de lingvistiko. Ni esperas, ke unu el la rezultoj de la kursoj de la Internacia FERIA Altlernejo, eĉ se ili ne arigas grandan nombron da partoprenantoj, estos ĝuste doni al la esperanto-instruistoj tiun ĉi materialon kiu tiom mmanas.

A.- Ni menciuj kelkajn aranĝojn semajnfinaĵojn, kiuj poros vekti la intereson: Unue la 26-an kaj 27-an de junio kultura semajnfino estos dediĉita al la temo: Kiel formiĝas Eŭropo aŭ Federacioj kaj Interŝtata kunlaboro. La ĉefprelegisto estos John Catling, brita funkciulo ĉe la ekonomia kaj socia komitato de la Eŭropa Komunumo en Bruselo. 25 jarojn post la naskiĝo de la Eŭropa Komunumo estos ĝuste interese ekzameni kiel ĝi estiĝis kaj kia estas ĝia rolo kaj fari komparojn kun ekzemple la etapoj de la Svisa federalismo, por ekzameni ĉu io estas lernebla de la spertoj de Svislando kaj de tiuj de la Eŭropa Komunumo?

Cl.- La 28-an kaj 29-an de aŭgusto kultura semajnfino estos dediĉita al la originala temo Ĉu okcidenta aŭ neŭtrale homa ĝentileco? La ĉefprelegistino estos Akiko Usink-Nagata, japanino edziniĝinta al nederlandano, redaktorino de "UN kaj ni". Ĉu neŭtrale homa ĝentileco estas dezirinda kaj ebla? Kaj kion devus asimili esperantisto, se subite la ĝentilec-normoj japanaj aŭ ĉinaj sin trudus en la esperanto-movadon? Pri ĉio tio kaj multaj aliaj demandoj oni debatos dum tiu ĉi semajnfino.

A.- Fine ni menciu plilongigitan kulturen semajnfinojn, kio okazos de la 18-a ĝis la 20-a de septembro. Claude Piron, instruisto pri psikologio en la Universitato de Ĝenevo instruos pri Agresemo kaj konfliktoj, bedaŭrinde tre aktuala temo.

Cl.- Ni menciu, ke dum la tuta jaro tiaj kulturajsemajnfinoj donas la eblecon malfermi al si novajn horizontojn. Ili ĝenerale disvolviĝas finmonate. Kaj ekde novembro antaŭsemajnfinaj kursoj de esperanto, kiujn gvidos Stefano Keller, instigos esperantistojn veturi al La Chaux-de-Fonds, ĉar de la merkredo ĝis la dimanĉo ili povos praktiki esperanton, unue por lertiĝi en la parola uzo, poste por kleriĝi. Se ili aldonos unu aŭ kelkajn ripoztagojn, jen belaj ferioj partopreneblaj dum la tuta jaro, en regiono montara, do rekomendinda ankaŭ sancele.

A.- Jen kion proponas la urbo La Chaux-de-Fonds al la esperantistoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014